



GEK 100

1906–2023

Dua Informilo

gravaj informoj

Braunschweig 2023-05-26 – 29 (– 06-02)

Karaj aliĝintoj,

ni ĝojas ke vi aliĝis al la 100-a Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig. Jen kelkaj aktualaj informoj:

Kongresa adreso

Centra renkontejo kaj kongresa adreso estas la junulargastejo:

Jugendherberge, Wendenstraße 30, 38100 Braunschweig, telefono: +49 531 8668850

Vendrede ekde 15:00 nia akceptejo estos malfermita en la **vestiblo**. Alie, la organizantoj estos atingeblaj en la konferenca oficejo en ĉambro **A1.13 en la unua etaĝo**. La malfermtempojn vi trovos en la kongreslibro.

Atentu: La pordo de la junulargastejo estas **ŝlosita ekde 21:00**. Se vi alvenos malpli frue, nepre informu nin antaŭe.

Organiza teamo

La organiza teamo estas atingebla per mobiltelefonoj:

- +49 176 4471 4714** Brigitte Kranz (aliĝoj, loĝigo)
- +49 176 4576 3799** Anne Höpken (loĝigo)
- +49 170 7721 210** Elisabeth Kuhl-Kruse (ekskursoj)
- +49 176 5629 5129** Stefan Krieghoff (financoj)
- +49 151 2660 1480** Michaela Stegmaier (mezaĝuloj, junuloj)
- +49 171 6832 317** Franz Kruse (kunordigo, programo, interreto)

Trajnveturantoj

Veturu ĝis la ĉefstacio (germane *Hauptbahnhof, Hbf.*) de Braunschweig. Sur la antaŭplaco ĉe kajo C prenu la tramon **1** aŭ **10** (direkto **Wenden**). Post proksimume 12 minutoj eliru ĉe la haltejo **Kaiserstraße**. De tie vi vidos la junulargastejon en distanco de proksimume 100 m. Transiru la straton ĉe la trafiklumo kaj turniĝu dekstren por atingi ĝin.

Parkejoj

La junulargastejo havas nur malgrandan propran parkejon kun 12 lokoj (enveturu maldekstre de la enirejo). Sed en la strato ► [Inselwall](#), malantaŭ la junulargastejo, laŭlonge de la parko, estas multaj senpagaj parklokoj. De tie oni facile piediras al la junulargastejo.

Nomŝildoj

Partoprenantoj ricevos nomŝildon kun sia nomo kaj aliaj informoj. **Bonvolu ĉiam porti la nomŝildon!** Ĝi estos via pruvilo pri aliĝo kaj manĝoj.

Loĝado en la junulargastejo

Por partoprenantoj loĝantaj en la junulargastejo la ĉambroj estos disponeblaj ekde 15:00 vendrede (2023-05-26) ĝis 10:00 lunde (2023-05-29) por anoj de la ĉefkongreso, ĝis 10:00 vendrede (2023-06-02) por anoj de la postkongreso. Bonvolu nepre forlasi vian ĉambron ĝustatempe, poste la ŝlosilkartoj ne plu funkcios.

Vi ne bezonas kunporti litotukojn, kaj la junulargastejo disponigos unu garnituron da mantukoj. Por eniri vian ĉambron vi ricevos ŝlosilkarton, kiun vi nepre devas redoni antaŭ via forveturo – alikaze vi pagos la altan koston de la karto.

Atentu: Bonvolu ĉiam ŝlosi vian ĉambropordon per la ŝlosilkarto kiam vi forlasas la ĉambron!

Restadejo/renkontejo

La **vestiblo** kaj la najbara saloneto **Heinrich II** servos kiel loko por ripozi kaj restadi inter kaj post la diversaj programeroj. La domo estas ŝlosita ekde 21:00, sed loĝantoj de la junulargastejo povos ĉiam ajn eniri per sia ĉambrokarto. Trinkaĵoj kaj iom da manĝetaĵoj estos disponeblaj.

Salonoj

La programeroj okazos en pluraj ejoj en piedira distanco. La kongreslibro enhavas skizon kiel atingi ilin, kaj tiu ĉi ► [Mapo](#) helpas trovi ilin.

- **Junulargastejo:** Ĉi tie okazos ĉefe prelegoj, laborgrupoj, kunsidoj kaj ankaŭ la libroservo, la lingvokurso kaj la kongresa oficejo. Krome tie estas renkontejo por ripozi kaj kunestadi.
- **Altstadtrathaus** (historia urbodomo en la malnova urbo): Ĉi tie okazos la malferma kunveno de la kongreso.
- **Funke Medienhaus** (gazetara domo): Ĉi tie okazos la vespera kultura programo dum la ĉefkongreso, la GEA-membrokunveno kaj laŭbezone iuj aliaj programeroj.
- **Kastelo:** En ĝi sabaton posttagmeze okazos publika prelego kaj apud ĝi Kultur-Lingva-Festivalo (KLF). Ni invitas ĉiujn partoprenantojn kunporti tipajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el siaj regionoj, kiujn ili povas tie ĉe nia tablo oferti por gustumi.
- **Jugendzentrum Mühle** (junulara centro): En ĝi okazos la junulara programo de KEKSO. Vespere post la vespera programo tie regule okazos „gufujo“, al kiu ankaŭ ne-junuloj estas kore invititaj.

Manĝotempoj

07:30 – 09:30 Matenmanĝo

12:00 – 13:00 Tagmanĝo

18:00 – 19:00 Vespermanĝo

Retpaĝaro kaj kongreslibro

Ĉiujn detalojn pri la kongreso vi trovas en nia retpaĝaro ► www.esperanto.de/eo/gek2023 kaj en la kongreslibro, kiun vi ricevos post via alveno surloke. La retpaĝoj jam nun enhavas la kompletan programon, la ekskursojn kaj la horaron. Etaj ŝanĝoj povas okazi ĝis la kongreso.

Programo

La jubilea kongreso havos aparte riĉan programon kun paralelaj programeroj. La kadra temo estas „Amikoj tutmonde“. Dum la ĉefkongreso (vendredo – lundo) okazos la ĉefaj prelegoj kaj la asocia

programo, sed ankaŭ dum la postkongreso (lundo – vendredo) estos kelkaj prelegoj kaj pluraj trejnadoj pri diversaj temoj.

PETO Por helpi la organizadon de la programo ni petas vin antaŭe anonci al ni vian intencon partopreni kelkajn elektitajn programerojn, precipe la trejnadojn. Bonvolu uzi por tio la formularon

► <https://www.esperanto.de/eo/gek2023-alighilo-programeroj>

Ekskursoj

Dum la ĉefkongreso (vendredo – lundo) okazos kvar urbogvidadoj kaj unu migrado en Esperanto. Ili ekos kaj finiĝos ĉe la junulargastejo. Dum la postkongreso (lundo – vendredo) estos pluraj ekskursoj kaj specialaj ekskursoj.

Kelkaj ekskursoj estas aparte pagendaj surloke. Ni klopodas minimumigi la prezojn por ekskursoj per grupaj biletoj kaj pruviĵoj pri pensiigo kaj handikapo. Por tio necesas laŭeble precize scii kiom da homoj kun kiuj pruviĵoj partoprenos kiujn ekskursojn. Kelkaj ekskursoj povas okazi nur se anonciĝas sufiĉe da partoprenontoj.

PETO Por helpi la organizadon de la ekskursoj bonvolu antaŭe anonci al ni, kiujn ekskursojn vi intencas partopreni. Ekskursoj kun maltro da aliĝoj eble ne povos okazi. Bonvolu uzi por tio la formularon

► www.esperanto.de/eo/gek2023-alighilo-ekskursoj

Lingvokurso por komencantoj

Dum la kongreso okazos ankaŭ lingvokurso por komencantoj, detalojn vi trovas en nia retpaĝaro. La kurso estas formale agnoskita kiel t.n. „kleriga libertempo“ (germane *Bildungsurlaub*) en la federacia lando Malsupra Saksio. Ĝi do ebligas al dungitoj ĝis kvin aldonajn (pagatajn) liberajn tagojn. La kurso estas senpaga kaj malfermita al la publiko, same la vesperaj kulturaj programeroj.

Libroservo

Dum la ĉefkongreso, do dum la pentekostaj tagoj, funkcios la ► [libroservo](#) de Wolfgang Schwanzer. Ĝi lokiĝos en la saloneto Heinrich I, tuj apud la junulargasteja giĉeto kaj la restadejo.

Solidara Fonduso

Ni starigis "Solidaran Fonduson por GEK", kiu subtenu partoprenon de homoj kiuj malfacile aŭ tute ne povas plene kovri siajn vojaĝkostojn. Jam atingis nin aliĝoj de junaj homoj el ekster Eŭropo kaj ni ŝatus monsubteni la vojaĝon de ili kun via helpo. Donacoj por tiu celo povas esti ĝirataj en EUR al la ĉi-apuda konto.

Bankkonto:

Ricevanto: Deutscher Esperanto-Bund

IBAN: DE09 5085 1952 0040 1145 97

BIC: HELADEF1ERB

Pagocelo: solidara fonduso GEK



Kongresa poŝtmarko

Okaze de la jubilea kongreso Germana Esperanto-Asocio eldonis specialan kongresan poŝtmarkon kun valoro de 0,85 € (germana tarifo por enlanda letero). Vi povos aĉeti ĝin kontraŭ 1,25 € (en blokoj de 10 poŝtmarkoj) dum la kongreso en nia kongresa oficejo – aŭ jam nun de nia oficejo en Berlino.



Tiu ĉi mapo montras krom niaj kongresejoj ankaŭ hotelojn, parkejojn kaj vidindaĵojn en nia kongresurbo Braunschweig: ► [Mapo](#)

En viaj kongresaj dokumentoj vi trovos i. a. prospekton kun mapo (germana/angla) kun Esperanto-traduko.



Paralele al la kongreso okazos la junulara renkontiĝo ► [Kreema Esperanto-Kurso](#) (KEKSO) en aparta ejo. Ĝiaj partoprenantoj havos liberan aliron ankaŭ al la kongreso.



Ĉu vi volas kundiskuti pri GEK en la mesaĝilo Telegram?

Skanu la ĉi-apudan QR-kodon, ĝi kondukas vin al la Telegram-grupo „GEK 2023 en Braunschweig“, kie aro da partoprenantoj diskutas pri la programo kaj aliaj aspektoj de la kongreso en Braunschweig.

Atentu nian retpaĝaron kun ĉiuj kongresaj detaloj:

www.esperanto.de/eo/gek2023

Ĝis baldaŭ!

Amike salutas la ► [organiza teamo](#)

gek@esperanto.de